

Registered at G.P.O. Melbourne, for transmission by post as newspaper.



La Suda Kruco

*Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.*

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 143 (12th Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. June-July, 1932.

—N.Z.E.A. SECTION— 9th Official Bulletin.

Membership Matters.

When the third year of NZEA activities began on 1st April, 1931, the Dominion was beset with a multitude of economic ills, and the Executive of the association recognized that a difficult year confronted it. The storm was, however, weathered during that year, and although the NZEA membership shrunk from 154 for the preceding year and from 210 for the first year to a modest 113, the Executive had the great satisfaction of being able to report that the year's program had been carried out in its entirety and that a small surplus existed in the NZEA funds.

The economic position obtaining at 1st April, 1932—the commencement of the present year's operations—did not show any improvement. As a matter of fact, the outlook appeared to be worse, for the Dominion's unemployed, which include several enthusiastic Esperantists, had increased to over 50,000; a state of affairs that must have its repercussions on the welfare of the NZEA.

With a view to enrolling members for the current year the NZEA issued in April last a circular setting out the position. As a result, the Association's hopes had, at the end of May, been partially realised, 48 members, including 3 new members, having come forward; but it now appears, notwithstanding that several constant supporters have not yet renewed their subscriptions but may be relied upon to do so at a later date, that there will be a further decrease in the membership this year. The Executive's task of bringing the NZEA through another

difficult year is however, already considerably lightened by the receipt of several generous donations, and another helping factor will be the shorter financial year resulting from the decision of the 3rd Congress to amend the NZEA constitution to provide for the closing of the accounts on 30th November annually. While fully appreciating the magnanimity of the members who have liberally and loyally supported the NZEA, it is felt, however, that the usefulness of the Association would be extended if the main principle underlying the Association's foundation could be more widely applied: that the NZEA comprise the greatest possible number of members and so rightly claim to be the national organisation of Dominion Esperantists and supporters of the international-language idea.

Donations Received.

The Executive cordially thanks its several well-wishers for monetary assistance. Donations to the NZEA General Fund—bright spots in these black days—are acknowledged as follows:—Mrs. L. W. Lovell-Smith (2), £1/5/-; Mrs. J. Allan, 10/6; Mr. M. Pavlinovich, 10/-; Mr. J. Keay, 5/-; Mesdames E. H. Wall, J. Hampton and I. F. Gillies, 2/6; Messrs. H. E. Facer, F. W. Luhnig, E. C. Jack, M. Parkinson, A. S. Hilliker and Dr. E. S. Dukes, 2/6; D. Tilly and V. Leck, 1/-. (A splendid response to but one of many contemporary appeals.—W.H.K.)

Propaganda.

General.—The NZEA has recently exploited a new field of propaganda and although the apparent gain to the Association may be negligible, it is likely the work will in the ultimate

prove of benefit to the movement generally. During this year it has become a practice to obtain from the hotel registers published in the newspapers the names of oversea visitors (other than English-speaking) to Wellington, and to forward each a propaganda leaflet and an "Esperanto Key." After returning to their native countries the persons concerned must, therefore, admit their making contact with Esperanto while in New Zealand, which will strengthen the claim of Esperanto to *universality*. Pursuing this practice the NZEA has supplied comprehensive information regarding Esperanto to visitors from Japan (2), Sweden (1), Holland (2), France (4), Germany (3), and Belgium (2). Leaflets and "Keys," with extra copies for distribution, were also forwarded to Vice-Admiral Ima-mura and Captain Kasuya of the Japanese training-ship "Asama," and to Captain Okada, of the "Iwate," during the cruisers' recent visit to the Dominion. In this manner the NZEA, although the outpost most distant from the world's Esperanto headquarters, is taking its place as a serviceable link in the long international-language chain.

Rotary.—The NZEA grasped the opportunity presented by the visit to the Dominion of the President of the Rotary International, Mr. S. W. Pascall, of London, to obtain a statement from him concerning Rotary and Esperanto. In a letter dated 13th May, 1932, Mr. Pascall expressed his good wishes for the welfare of the NZEA, and advised: "...I am interested to hear of the progress of your Association in New Zealand. Rotary is not, of course, committed to Esperanto, although it is in entire sympathy with your desire to provide an easier method of intercommunication between peoples of different languages. On many occasions I have felt the lack of a suitable medium of expression in an international gathering. "... Due publicity in the Wellington Press was subsequently given Mr. Pascall's statements.

Secretary's Reminder.

NZEA subscriptions (2/6 per annum) fell due on 1st April last. Members who enrol or re-enrol during the current financial year are registered as "Standfast" members as a permanent record of their support at a critical time in the Association's history. Pen-

ny stamps or postal-notes may be used in payment of subscriptions, and correspondence should in the meantime be addressed to Mr. W. H. King, Hon. Sec., Secretary's Office, G.P.O., Wellington.

KRONIKO.

Auckland, Nov-Zelando.—En lundo, la la de Februaro, la Auckland'a societo komencis kunveni por 1932, kaj de post tiam daŭris ĉiusemajne. Estas kuraĝige, sciigi ke en la kuranta sezono naŭ novaj anoj aliĝis kaj ĝis nun tiuj progresis kontentige en sia studado. La 4an de Aprilo okazis la ĝenerala kunveno ĉiujara. Dek kvin membroj ĉeestis kaj elektis oficistojn por la jaro: Prezidanto, s-ro J. S. Russell; Vicprez., s-ro pastro Woolloxall; Hon. Sek-o kaj Kasisto, s-ro C. Brandon (16 Wairaki Rd., Mt. Eden). Forta komitato estis elektita el la gemembroj. Pasintan jaron paroladoj kaj dialogoj estis radie brodkastitaj kaj kaŭzis iom da intereso; la societo profitis per la laboro tiukampe.

Christchurch, N.Z.—Esperanto Societo kaj ankaŭ klaso konsistanta el 20 viglaj geanoj, gvidata sub aŭspicio de la W.E.A. (Laborista Eduka Asocio), nun funkcias ĉi-urbe. Dum la W.E.A. sezono la societanoj partoprenas ĉiulunde la klason, kiu sin subtenas pleje per la testamentmono (£500) de la mortinta s-ino Ensom, Christchurch-anino. Efikan propagandon faras s-ro N. M. Bell, kiu, malgraŭ nebona sanstato, regule aperigas ĉiumonatan kolonon Esperantan en "The Christchurch Star." La laboro estas tre grava kaj jam daŭras multajn monatojn. S-ro B. Kalin, societano, forlasis por mallonge viziti sian patrujon, Svislandon. Oni atendas lian revenon je la jarfino, kiam sendube li regalos nin per vojaĝrakontoj.

Masterton, N.Z.—Decidiĝis ŝanĝi la nomon de nia grupo al 'klubo,' kaj estontece la membroj agos sub la aŭspicio de la Masterton Esperanto Klubo. Jara agado komencis je la 2a de Februaro, kiam agkomitato estis elektita; kaj la ĉiusemajnaj klasoj daŭris regule de post la 23a de la sammonato. Klubanoj nunaj nombras dudek ses—preskaŭ duobla la antaŭjara membraron; kaj la meznombro da klubĉeestantoj estas dekok. S-ro A. Dewar, D.B.E.A., klubinstruanto, pleje respondecas pro la

kresko de la klubanaro kaj pro ties progreso. Frue prezentigos klubeje la komedio, "Kara Panjo," kaj oni poste ĝuos durolajn dialogojn.

Wanganui, N.Z.—Spite al okupado, s-ro S. I. Nolan, malnova amiko de Esp-o, kiu dum vintraj monatoj de la pasintjaro gvidis ĉiusemajnan rondeton tie-ĉi, same agos ĉi-jare.

Wellington, N.Z.—Agema oficistaro kondukas la lokan klubon tra la severa krizo ekonomia ĝis pli prosperaj tagoj, kvankam la membro-listo kluba grave malgrandiĝis nunjaron-nesurpriza fakto. Tamen, duhoraj kunvenoj okazis ĉiumarde, kaj daŭras la alta grado de la klubprogramoj, entenantaj unu horon da instruado. Raporteto en ambaŭ ĉefurbaj taggazetoj sekvas ĉiun kunvenon; la vic-prez., s-ro E. C. Jack, certigas, ke ĉiu raporto enhavas trafan mencion de presinda progreso de Esp-o. Tiel sciigas pri nia afero la ĝenerala publiko, fakuloj kaj aŭtoritatuloj.

KRONIKO.

Brisbano, Kvinslando.—La 26an de aprilo s-ro M. Hyde paroladis pri "Akro de stilo en Esp-o." Li akcentis la neceson multe legi en la Esp-a literaturo kaj konsilis la studadon de la poezio. Oni per tio akirus scion pri trafaj frazoj, ĉar lingvo ne estas nur kolekto de vortoj sed ankaŭ de frazoj.

S-ro H. Fay parolis la 10an de majo pri Esperantismo kaj la mondmilito de 1933." Kia estos la sintenado de la Esp-istoj rilate al mondpolitiko kaj malarmado? Kiel ni povas agi, por ke el la nuna tutmonda krizo ne naskiĝu multe pli terura tutmonda milito? Jen demandoj de la parolinto, kiu tamen kredas, ke la popoloj fine faros "unu grandan rondon familion."

La societanoj kunvenis la 23an de aprilo ĉe la hejmo de s-ro H. Mills, Moorooka, kaj de tie faris ekskursojn al div. lokoj. Poste on "piknike" manĝis ĉe ges-roj Mills kaj la vesperon pasigis per karto, ludoj ktp. Tiel agrable estis, ke s-ro Mills devis ja fopeli nin, por ke ni ne maltrafu la lastan tramon. Ĝuitan tagon kaj . . . gajno por la societa kaso.

Ĉi tiun jaron Brisbanaj lernantoj havos okazon partopreni en la J. G. Pyke Memoriga Ekzameno, kaj ni esperas prezenti kelkajn kandidatojn.

LA PETERSHAM'A FILIO DE LA SIDNEJA ESPERANTA SOCIETO.

Est. Redaktanto:—Bv. permesu, ke mi iom informi pri la progreso de la suprenomita (p. 331 S.K.). Antaŭ 2-3 semajnoj okazis la unua provekzameno. Sidis la tuta grupo (10 plenaĝaj gelerntantoj), en kiu estis neniu, kiu komencis lerni E-ton antaŭ la 11a de jan-o. Estis necese, ke ĉiu persono, sidante aparte unu de alia, respondu ĝuste almenaŭ al dudek el trideko de demandoj, kaj ankaŭ, ke ĉiu skribe traduku, kun sufiĉe da klareco, du el tri anekdotoj. La rezultoj estis tre kontentigaj. La gvidantoj limigis la demandojn nur je tiuj, kiujn la lernantoj pritraktis dum la unua kurso ĝis la ekzamena tempo. Estis 4 lernantoj kaj 6 -inoj. La virinoj faris multe pli bone ol la viroj, nome: 23, 21, 20, 18, 17 kaj 16 poentoj. Pri la viroj, ho ve! neniu el la kvar atingis eĉ duonon da necesaj poentoj. Mi forte opinias, ke la sinjorinoj elmontras pli da entuziasmo kaj atentemo ol la s-roj. Ĝisdate la filio kreskiĝis ĝis 55 anoj kaj lernantoj, kaj ankoraŭ tiaj varbiĝas. Mi fieras pri la sukceso de la entrepreno kaj forte kredas je ĝia estonteco. Korajn salutojn al vi kaj al ĉiuj legantoj de la S.K. Sincere via, A. W. Peacock (instruisto).

ESPERANTO ON THE MARCH.

Since our last issue we have learned—That "Ekrelo," Dircksenstrasse 42, Berlin C25, intend to publish in 16 volumes (3000 pages) the entire works of Lenin. The first vol. will appear Sept.-Oct., 1932.

That by decree of the People's Commissar for Instruction the teaching of Esperanto during 1931-32 must be uninterrupted in the schools of Sebastopol (Crimea). At a summer school 1500 students from 14 schools have learned the language, says La Movado, Paris, April.

That the Flemish Touring Assoc. (110,000 members) is printing an Esperanto course in its fortnightly magazine, Toerisme.

That the Estonian Govt. by a decree dated 18 Feb., 1932, permits officials to wear an Esperanto badge on their uniform.

That the Govt. inspector who visited St. Paul's School, Worcester, Eng., on 18 Feb., reports: Esperanto is still

being taught with success. It is interesting and pleasant to hear the elder boys conversing easily together in a language other than their mother-tongue.

That "The Sorrows of Werther" (Goethe) has been translated by a German, and will be published by the Belgian Esperanto Assoc.

That Aracaju, capital of Sergipe, Brazil, has now a "Zamenhof Street."

That Ludwig Renn, world-famed author of "War," a work held by Winston Churchill to be greater than "All Quiet," has been elected president of the International Association of Revolutionary Esperanto Authors.

That Honolulu University has an Esperanto course, and that Esperanto is an optional subject in a large Honolulu High School.

LA SPAREMAÇO.

Iam vivis homo, kiu, ne volante nŝpari, penis kreskigi terpomojn en la toambo-tereto de sia mortinta edzino. Ankoraŭ alia tia-emulo, vekiginte unu matenon, vidis, ke la edzino kuŝas mortinta ĉe lia flanko. Saltinte el lito, li kuregis ĝis la kuirejo, kriante, "Servisto, boligu ĉitumatene nur unu oveton!"

La administracio de La Suda Krucio, aŭdinte tiujn anekdotojn, penis pri tiuj poŝgardemuloj, kiuj, facile povante pagi sian abonon, tamen preferas ricevadi la senpagajn ekzemplerojn.

MALMULTE KONATAJ VORTOI DE ZAMENHOF.

(No. 1)

Ni havis jam la okazon rimarki, ke unu el la plej gravaj rimedoj por vastigi nian aferon estas konstanta parolado pri ĝi en gazetoj. La gazetaro en nia tempo ne senprave estas nomata la sesa regno potenca, kaj senlace ni devas ĝin devigadi kiel eble pli ofte tuŝadi nian aferon, ĉar nur tiam ni povas esperi pli aŭ malpli frue aligi al nia afero la grandegan indiferentan amason de la publiko. Se unu fojo ne prosperis, ni devas netimigite provi la duan fojon, la trian k. c.; se unu gazeto estas obstina, ni devas nin turni al alia gazeto; se ni ne povas paroligi la gazeton en unu formo, ni devas provi formon alian.

(Originala Verkaro P.93)

TO OUR SUPPORTERS

Hearty thanks for the following:—
Mr. E. Chandler, 5/-, June, '33; Miss D. Wells, 4/6, Mar., '33; Mr. E. McKenzie, 4/6, Apr., '32; Mr. Rawson (sales), 4/8; Mr. F. Pavlinovich, 5/-, Mar., '33; "Two Friends" (gift), 5/-; "Espero" (gift), 5/-; Mr. Cox (sale), 4d.; s-ro Fajnszejn (anonco), one dol. (6/3); "Die Hoffnung" (gift), 5/-; Coles' ad., 51/-; ad., 2/-; Mr. C. Dornbusch, 4/6, July, '33; Miss E. Sanderson, 4/6, May, '33; Mr. J. Cossar, 4/6, Mar., '32; Miss Bostock, 2/-, Dec., '33; Rev. Galloway, 4/6, Mar., '33; Mrs. A. Carter, 4/6, June, '33; Miss V. Newnham, 5d.; Mrs. Wilson, 4/6, June, '33; Miss H. Conwell, 4/6, May, '33; Mr. M. Ravelich, 5/-, May, '33; Mr. W. King, 5/-, Aug., '33; subvention from N.Z.E.A., 22/6; Mr. C. Kidd, 10/-, June, '31; Miss Carrick (sales), 6/-; Brisbane Club (adv.), 5/6, May, '33.—
Total: £9/6/2.

"A.P.A."

Just before the war Mr. (now Sir) John E. Wrench, editor of the London "Spectator," founded the Overseas League, and in 1918 the English-speaking Union. Then, in 1930, his vision broadened. He had come to the conclusion that "race imperialism is not enough; we must organise the world on the basis of all peoples." So the All Peoples' Association was born, "a society of men and women, belonging to all nations," which seeks "to remove prejudice and misunderstanding between the peoples of the world," and offers to join hands with "all organisations which aim at promoting world friendship and international co-operation." It has already a membership of some two or three thousand, with branches in many parts of the globe.

The ideal that actuates the A.P.A. is very similar to the "interna ideo" of Esperanto. It seeks to stimulate the growth of "international-mindedness" by making contacts between thinking people of all tongues, and confirming such contact by the publication of a common magazine for members "printed in at least three languages, pending the time when the world will have a common language, which will not necessarily be English." Further, it "strongly advocates the learning by its members of one or two languages other than their own."

To the Esperantist, provided with the means of meeting, on the ground of a neutral language, men of all civilised tongues, great and small, in intelligent, profitable intercourse, the method by which the A.P.A. seeks to do the same thing must seem cumbersome and relatively ineffectual. He would feel that the Association is, with the best intentions, perpetuating one of the most formidable hindrances to international understanding—the blighting belief that the curse of language diversity can at best be alleviated only by cramming the skull with one foreign idiom after another. It is, however, favorable to Esperanto, and its organ, "World Service," while printed mainly in English, French and German, gives space to the interlanguage.

Active membership of the A.P.A., it would seem, will thus largely be built up from those fortunate in possessing tongues other than their own. The Zamenhofan Esperantist is, within the framework of his own organisation, working for world-amity in much the same spirit as the A.P.A., but the joining of this body by Esperantists is desirable, inasmuch as their activity may influence it to a more marked recognition of the value of the auxiliary language. Sub. 10/- year. Address: 99 Gower-st., London, W.C1.

KIOMA PROPONO?

La administracio havas por vendi konte de la kaso de La Suda Krucio kompletan kolekton jam de n-ro 1 (julio 1920). Tiu, kiu en la sekvantaj ses monatoj proponas le plej altan prezon rajtas ilin ricevi. Laŭ nia scio ĝi estas la sola kompleta kolekto aĉetebla en la mondo.

— ADDRESS BOOK — OF THE BOHEMIAN ESPERANTO SERVICE POTSTEJN, CZECHOSLOVAKIA.

This booklet aims to become a complete indicator to the worldwide Esperanto movement. To that end it is striving to incorporate the address of every active Esperantist or Esperanto enterprise. Last year it contained 1256 addresses, in 40 countries; in June of this year a yet larger edition left the press. It costs only one shilling to have your name and address included; if you send a snap and another sixpence your photo will also appear. The "B.E.S-a Adresaro" brings you correspondents from all parts of the world, on almost any theme imaginable.

Support it and serve yourself by sending four reply-coupons (6 for photo inc.) to agent: Box 731F, P.O., Elizabeth-street, Melb.

EKZAMENO B.E.A.

Sukcesis ĉe la plej lastaj B.E.A. ekzamenoj:—Elementa: S-ro P. W. Frampton, Christchurch, N.Z.; supra: S-ro C. W. Brandon, Auckland, N.Z. Koran gratulon.

NASKIGO.

BANHAM (naskita Dawes):—Al Hilda, edzino de Reginald Banham, fileto (Frank Marcus), en la 27a de aprilo ĉe "Llandyssil" hospitalo, Essendon, Melburno. Ambaŭ bon-sanaĵ.

La **M**EMORON PLIFORTIGAS KAJ PERFEKTIGAS laŭ metodo trifojie premiita de la Pariza Akademio, Profesoro de mnemoniko D. FAJNSTEJN, VILNO (Pollando), Zawalna str. 15.

Dank'al mia metodo de mnemoniko, bazita sur leĝoj de PSIKOLOGIO, FIZIOLOGIO, LOGIKO KAJ PEDAGOGIO, LA MEMORO RESTARIGAS ĉe tiuj personoj, kiuj ĝin perdis, PLIBONIGAS ĉe tiuj, kiuj havas malbonan kaj PERFEKTIGAS ĉe tiuj, kiuj havas bonan; samtempe FORIGAS LA DISTRECO KAJ MALDILIGENTECO, FORTIGAS LA VOLO KAJ PLIBONIGAS ĈIUN PSIKAJN KAPABLOJN (influan pozitive la KARAKTERON kaj la NERVAN SISTEMON) ĉe personoj ĈIUĜAJ, komencante de 8 jaroj ĜIS GRIZHARA MALJUNECO.

Postulu senpage prospektojn de la memorfortiga perkoresponda kurso en Esperanto.

NIA POŬTO.

B. en To. "Akurate" signifas angle "punctually, prompt to date and time." "Akurata pago" ne signifas "correct payment" sed "punctual payment"; esprimo kia "akurata traduko" havas nenian signifon, krom se oni aludas al traduko farita je antaŭe difnita horo aŭ tago. Por la angla vorto "accurate" estas uzeblaj (laŭ cirkonstancoj) la vortoj "ĝusta, preciza, korekta, senerara" kaj aliaj; sed neniam "akurata." Sen la fundamenta signifo "punctual," la vorto "akurata" ĉesas havi apartan utilon; kaj estas tre bedaŭrinde, ke kelkaj Esp-istoj ĝin misuzas. (B.L. en International Language, Okt., 1930).

M. en Y. "Midnight," "Midsummer" kaj "Midday." La demandinto bv. legi la regulon 11-an de Esp-o pri la kunmetitaj vortoj, kaj li tuj komprenos, ke la vortoj "noktomezo," "somero-mezo" kaj "tagmezo" estas la solaj uzotaj, se oni parolas pri la "mezo," ĉar la ĉefa vorto staras en la fino.

N. en I. "Left alone with..." "Ŝi lasis min duopa kun St. John" (Jane Eyre, trad. Bulthuis).

P. Dean, Podgora, Primorska Bano-vina, Jugoslavio: Via ŝatata abono estas jam finiĝinta. Ni fidas al vi!

M. en Yo. Niaopinie la vojaĝaj la priskriboj de s-ro J. Major estas pli interesaj ol tiuj de s-ro Scherer. La unua s-ro pli intime tuŝas la vivon de la popoloj kaj eldiras sian internan penson rilate al la viditaĵoj. Liaj kritikoj estas kuraĝe pikaj, liaj laŭdoj prudentaj.

PRESIDENT DOUMER AND ESPERANTO.

La Movado (Paris) informs us that the late President had accepted honorary presidentship of the coming world Esperanto Congress in Paris, and had promised to attend in person its inauguration sittings.

PRI "BREMSI."

S-ro D.B.T. en Ips. trovis la radikon "brems" en rusa gazeto. Ne sciante ĝian signifon, li demandis al ni. Aldone li skribis: Se ĉiuj naciaj sekcioj aldonadas novajn vortojn al la lingvo, ni baldaŭ havos denove la babelturon.

La vorto estas germandevena:— Bremsen, to apply the brake to a wheel (ein Rad bremsen). La radikon enhavas "La Marista Terminaro" (Rollet de l'Isle), Plena Vortaro de Boirac, Verax (egalaĵo de la Franca "frein," mekanika sistemo por malakceli, haltigi aŭ reguligi movon aŭ funkciadon), la Worterbuch Deutsch-Esperanto de Pfeffer kaj verŝajne aliaj. Privat kaj kelkaj bonaj verkistoj uzas ĝin. Per tio oni evitas la longajn formojn, "malakceligilo, haltigilo (maŝina, veturila).

KIAL NE APERIS JUNIA N-RO?

Tenante en penso la absolutan neceson eldoni la N.Z. specialan n-ron julian, kaj tenante en la redakcia poŝto nur dudekelke da ŝilingoj, mi devis, jam la 28an de majo, fine forlasi esperon enmondigi n-ron por junio. Tiel agante, mi procedas laŭ decido farita en junio 1931, nome eldoni laŭ la enhavo de la S.K. kaso.—(Red.)

RAPORTOJ PETATAJ.

Ni petas informojn pri la jenaj kursoj, pri kies ekzisto sciigis s-ro Rawson. Tiu de s-ro Lanyon, ĉe Box Hill (melburna antaŭurbo), kun 18 membroj; tiu de la Amikoj de la Sovet-Unio (gvidanto, s-ro Brooks), 20 membroj; tiu de la Unitariana Eklezio, 18 membroj; kaj tiu de la Brighton'a Teknika Lernejo (s-ro Clive Hughes, gvidanto), pri kiu aperis bona artikolo en "The Education Gazette kaj Teachers' Aid" antaŭ monatoj. La Koburga Klubo havas ĉ. 20 anojn. Antaŭdankon!

KVAKERISMO KAJ PACO

Mi havas senpagajn specimenajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj Paco por disdoni.

BONVOLE PETU PER ILUSTRITA POŬTKARTO AŬ LETERO.

DR. FRED. J. WILLIAMS,

Samarai, PAPUA.

(fratorganoj afable represu)

LETERO DE D-RO ZAMENHOF. (represita el "La Movado," Parizo)

La jena letero estas tre valora skribo, bedaŭrinde ne entenata en la kolekto "Originala Verkaro," kompilita de D-ro Dietterle.

"Ni publikigas ĉi sube la jenan interesan leteron de la Majstro, skribitan unu jaron antaŭ la universala Kongreso en Boulogne. En ĝi li donas konsilojn pri tiu Kongreso, responde al petoj de S-ro Michaux, unu el la organizantoj, kiu estis prezidanto de la organiza Komitato." (La Movado.)

Varsovio, 26-9-1904.

Al Sinjoro Michaux.

Kara Sinjoro, Viajn du leterojn kaj ankaŭ la gazetojn mi ricevis. Estas tre bone ke vi vin turnis al la Franca Societo por Propagando de Esperanto, ĉar efektive estas necese, ke kiel oficiala aranĝanto de la Kongreso aperu, ne la Bulonja Grupo, sed la tuta F.S.P.P.E.

Pri la tempo, kiu estas la plej bona por la Kongreso, mi nenion povas diri al vi; **por mi persone estas tute egale** kian tempon vi elektos. Eble estus utile fari publikan demandon pri tio per la Esperantaj Gazetoj. Pri la Rusoj, mi povas diri, ke la lernado en la Universitatoj, gimnazioj, k.t.p. finiĝas en nia lando ĉirkaŭ la 12/25 de junio; la libertempoj en nia lando estas de la fino de junio (novastile) ĝis la komenco de Septembro. Sekve ĉiu, kiu havas ian staton al instruado aŭ lernado, havos nenian eblon alveturi antaŭ la fino de Junio aŭ post la komenco de septembro.

Sed, ĉar por la Kongreso havas signifon nur tiuj personoj, kiuj intencas efektive alveturi, tial mi pensas, ke estus bone fari jenon: per publikigo en la esperantaj gazetoj peti, ke ĉiu, kiu havas la intencan partopreni en la Kongreso, sciigu vin jam nun pri tio-ĉi, kaj ke li skribu al vi, ĉu la tempo, kiun vi supozas elekti, estas por li akceptebla. Tiam vi povos elekti aŭ forĵeti tiun aŭ alian tempon laŭ la oportuneco de la plimulto aŭ almenaŭ de la Esperantistoj plej gravaj.

En la nuna momento ne venas al mi en la kapon kia teatraĵo estus la plej bona por la Kongreso; sed ŝajnas al mi, ke la Moliera "Le Mèdecin malgré lui" estos bona.

Multe helpi al vi per iaj bonaj konsiloj mi ne povas, ĉar sidante ĉiam dome, mi tre malmulte konas la mondon kaj mi neniam ankoraŭ partoprenis en ia Kongreso aŭ publika festo. Sed ĉion, kio venos al mi en la kapon, mi, de tempo al tempo, skribados al vi. Nur, jam antaŭe mi petas vin, ke ĉion, kion mi skribos al vi, vi volu rigardi nur kiel mian **opinion** (kiu absolute ne devas vin per io ĝeni aŭ ligi) sed **ne** kiel mian **deziron**.

Kiam mi estos iom pli libera (post 5 aŭ 6 semajnoj), mi intencas verki ian specialan **himnon** por la malfermo de la Kongreso. Tiu himno komencigos kiel solena preĝo (sed preĝo pure filozofia, kaj neŭtrale homa, por ke ĝi tuŝu la religiajn konvinkojn de neniu en la mondo), kaj finiĝos kiel brua, vigliga, flamiga kaj esperiga marŝo.

Mi intencas presigi por la Kongreso projekton de Deklaracio pri la esenco de la Esperantismo, kaj se, post matura diskutado en la Kongreso, tiu ĉi deklaracio estos akceptita, ni povos ĝin dissendi kiel deklaracio de la Kongreso al ĉiuj gazetoj de la mondo, por fermi la buŝon al ĉiuj atakoj de niaj kontraŭuloj.

Mi pensas, ke ni devas frutempe publikigi pri la **kondiĉoj** sub kiuj ĉiu povos partopreni en la Kongreso, kaj en ĉiuj ĝiaj festoj kaj amuzoj (t.e. kiom oni devas pagi, kiu povas havi rajton de voĉo, kaj kiu povos esti nur gasto, k.t.p.).

La Kongreso devas efiki sur la **sentojn**, kaj fari **impreson**, kiel eble pli grandan kaj neforgeseblan impreson. Multe da soleneco, muziko, efektoj por la okulo, k.t.p. Ju pli ni efikos sur la sentojn, des pli niaj Kongresoj kaj, sekve ankaŭ nia afero, fariĝos popularaj en la mondo. Estas domaĝe, ke ni devas akiradi la mondon en **tia** maniero; sed la homoj havas tian naturon, ke oni povas ilin venki nur per la **sentoj**, dum per seka parolado vi nenion konvinkos. Ni devas peni, ke niaj Kongresoj per sia soleneco kaj ĉarmeco fariĝu korekscita, religia centro, kiu allogados ĉiujare la amikojn de internacia frateco el la tuta mondo.

Mi pensas, ke oni devos tiatempe dissendi inviton por la Kongreso al multaj eminentuloj, kaj al la plej gravaj gazetoj de la mondo. Kredeble ankaŭ ekspozicion oni devos aranĝi en la Kongreso.

La Franca Societo por Propagando de Esperanto devas de tempo al tempo publikigadi la supozatan programon de la Kongreso (almenaŭ la punktojn pri kiuj estos diskutate), por ke ĉiu povu prepariĝi aŭ ankaŭ proponi ian aldonon aŭ ŝanĝon por la programo.

Oni devos zorgi, ke post la malfermo de la Kongreso aperu telegramoj pri tiu ĉi en la ĉefaj gazetoj de la mondo kaj pri la solenaĵoj de la Kongreso aperu pentraĵoj en la ilustritaj gazetoj.

Ĉiuj gastoj de la Kongreso devos ricevi ian memoraĵon, kiun ili poste povus montri al siaj konatoj.

La Kongreso devos ellaboradi fortikan organizadon de nia tuta laborado.

Eble estus bone aranĝi ian historio-etnografian maskobalon aŭ promenadon, finiĝantan per ia danco de internacia frateco?

Mi persone bedaŭrinde ne povas multe zorgi pri la Kongreso, ĉar mia tempo estas ĉiam treege okupata kaj mia kapo estas plena de diversaj zorgoj. Sed se eble venos al mi en la kapon ia nova ideo, mi skribos al vi.

Via, ZAMENHOF.

P.S. Mi skribas al vi ĉion sub la influo de la momento. Multe el tio, kion mi skribas estas nesufiĉe riprenita, kaj eble eĉ tre naiva kaj fantazia; tial mi petas vin ke vi ne publikigu miajn leterojn. Z.

NEKROLOGO.

Okazis je la 13a de Junio ĉe Remuera, Aŭklando, N.Z., la morto de sinjoro pastro J. H. Hawkes, pensiulo de la Anglikana Eklezio de post la jaro 1913. Naskita en Dublin, Irlando, en 1843, pastro Hawkes venis al Nov-Zelando antaŭ 50 jaroj, kaj estis unu el la fruaj altlernejestroj ĉe Whangarei, Nord-Aŭklando. Oni lin povas prave nomi Nov-Zelanda pioniro Esperantista, ĉar tre frue en la nuna jarcento li, kune kun nia fidela nuna U.E.A. delegito, s-ro D. Tilly, fondis Esperanto-klason, kiu floris dum kelkaj jaroj ĉe Whangarei. Translokiĝinte poste al Aŭklando, pastro Hawkes daŭris sian agadon por Esperanto tie dum multaj jaroj ĝis tiam, kiam maljuneco devigis lin ĉesi tian laboron. La skribanto trezoras la memoron de vizito al lia pastra moŝto, tiam 79-jara. Li renkontis tre entuziasman, viglan samideanon, kiu malgraŭ sia profunda aĝo, portis koran intereson pri Esperanto kaj vivis en vera Esperantista atmosfero.

—W.H.K.

Westralian Esperanto Society, Perth, W.A. kunvenas ĉiusemajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth. Komunikadojn al la sekretario.

Masterton Esperanto Club — Meet every Tuesday at 8 p.m. in the Y.M.C.A., Church-st., Masterton. Hon. President, Mr. G. R. Sykes, M.P.; President Mr. A. Dewar D.B.E.A.; Vice-Presidents, Mrs. McNab and Mr. B. Johns; Secretary, Mr. Howard Franks, 38 Worksop-rd. Visitors always welcome.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario; s-ro C. Brandon. Komunikadojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Holmes, D.B.E.A.; sekretario f-ino V. Cox, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 18¹/₂a horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: s-ro F. T. Simon. Vicprezidantoj: s-roj H. Hutton kaj S. Parry. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del. U.E.A.). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A.; Vice-President, Mr. E. C. Jack; Secretary, Miss G. Carty, 33 Tanera-cr., Brooklyn; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del. U.E.A. Write for book list.